I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 11 - Aŭgusto 1954

INFORMO: LA REDAKTORO DE LA "INFORMA BULTENO" ESTAS TRANSLOGITA EN "VIA DONATO CRETI N°61 B O L O G N A"

## ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO
## IVa NACIA KONGRESO 25-26 SEPTEMBRO 1954

Dum la tagoj 25 kaj 26 de septembro 1954 okazos en LA SPEZIA, ĉe la sidejo de la tiea "DOPOLAVORO FERROVIARIO" (Fervojista Klubo), Via XX Settembre 122 R. la IVa NACIA KONGRESO DE LA FERVOJISTAJ ESPERANTISTOJ.

Dum ni alvokas ĉiujn niajn anojn, kiuj ne estos deĵorantaj, ĉeesti, konsideran te la apartan graveoon de nia nunjara kongreso (ankaŭ ĉar, laŭ la Statuto, oni devas translokigi la Sekretariejon de Verona al alia urbo, fiksota de la Kongreso mem), ni sciigas ke oni invitos partopreni la Kongreson ankaŭ Samideanojn de Esperantoj-Grupoj najbaraj al LA SPEZIA, kaj reprezentantojn de Naciaj Fervojistaj Esperantoj-Asociaj aliĝintaj al I.F.E.F.

### T A G O R D O

1 - Raporto de la Prezidanto
2 - Raporto de la Kasisto
3 - Raporto pri la IVa Internacia Kongreso I.F.E.F.
4 - Elekto de la nova estraro de I.F.E.A.
5 - Eventualaĵoj kaj diversaĵoj

Male al tio kio okazis en niaj antaŭaj Kongresoj, ĉijare ne estis eblo al ni okazigi la kongreson en la sama loko de la Nacia Kongreso de F.E.I., kiu okazos en Sardinio en la tagoj de la 24a al la 29a de Aŭgusto.

Tion kaŭzas la deĵorpostuloj de multaj niaj anoj, kiuj ne povus ĉeesti, jam elĉerpinte siajn feriotagojn, kaŭze de la VI^ Internacia Kongreso de la Fervojistaj Esperantistoj en Verona.

Bedaŭrante ĉitiun maloportunaĵon, ni bondeziras kaj al Nacia Kongreso F.E.I. kaj al la nia, plenan, kompletan sukceson.

LA PREZIDANTO DE I.F.E.A.
(Kav. G. ZACCONI)

### P R O G R A M O

Septembro 1954
25 = matene: alveno de la Kongresanoj
= postagmeze: 13 h. = Komuna tagmanĝo
14,20 h. = Ŝipekskurso al Portovenere
19,30 h. = Komuna vespermanĝo
= vespere: 21 h. = Interfratiĝa vespero

Septembro 1954

26 = matene: 9 h. = Malfermo de la Kongreso kaj daŭrigo de la laboroj ĝis la elĉerpiĝo de la Tagordo
13 h. = Komuna tagmanĝo
14 h. = Fermigo de la kongreso kaj vizito al la Urbo.

=======================

Ni sciigas al tiuj kiuj partoprenos la kongreson dum la du antaŭdiritaj tagoj, sendi sian aliĝon ĝustatempe al kolego samideano FONTANA p.i. Lucinao, ĉe "Dopolavoro Ferroviario" Via XX Settembre 122 R, LA SPEZIA, por ebligi bonajn aranĝojn de l'aferoj. Kelkaj ĉambroj povas esti disponeblaj en la fervojista dormejo.

La kosto de unulita hotelĉambro estos L. 700.-, kaj de dulita L.1400 minimume.

Ekskurso al Portovenere kostos 140 lirojn por iro kaj reveno.

Komuna tagmanĝo kaj vespermanĝo (unua kaj dua pladoj, fruktoj, pano, sen vino) kostos ĉirkaŭ 320 lirojn.

Ni denove petas la kongresanojn sendi ĝustatempe sian aliĝon, sin devigante, per la sendo de l'aliĝo, ebligi al la Organiza Komitato honorinde plenumi siajn promesojn, ne mankigante al ĝi la fiksitan kotizon, eĉ en okazo de lastmomenta malhelpo al patopreno; kaj sciigante ĉu ili partoprenos al komuna tagmanĝo aranĝota de la tiea "Dopolavoro Ferroviario"

Kopio de la invito al la Eksterlandaj Asocioj:

Dum la 25a kaj 26a de Septembro 1954, okazos en "LA SPEZIA", urbo de la Tirena marbordo, nia IVa Nacia Kongreso.

Ni petas vin honori nian kongreson, sendante reprezentanton de via Asocio, kiu estos nia gasto dum la kongreso.

Vi lagos nian programon sur ĉimonata nia "Informa Bulteno".

Ni atendas vian konfirmon kaj sendas al vi dankojn kaj plej bonajn salutojn.

La Sekretario

## 26a KONGRESO DE LA ITALAJ ESPERANTISTOJ

Sassari - 24-29 aŭgusto 1954
sub la Patronado de la Prezidanto de la Itala Respubliko
LUIGI EINAUDI

### PROGRAMO

Mardon 24.a de aŭgusto
- matene: Informservo ĉe la stacidomo - Disdono de la Kongresa koverto ĉe la Sekretariejo (Universitato)
- vespere: Interkona vespero

Merkredon 25.a de aŭgusto
- matene: Oficiala malfermo - Komuna fotografado
- posttagmeze: Generala Kunsido de la Itala Esperanto-Federacio - skribaj ekzamenoj
- vespere: Akcepto ĉe la Provincestro

Jaŭdon 26.a de aŭgusto
- matene: Daŭrigo de la laboroj de I.E.F. - Daŭrigo de la skribaj ekzamenoj
- posttagmeze: Akcepto ĉe la Urbodomo
- vespere: Arta vespero

Vendredon 27.a de aŭgusto
- matene: Kunsido de la Generala Konsilantaro de la I.I.E.-Fakaj kunvenoj
- posttagmeze: Vizito de la urbo - Voĉaj ekzamenoj
- vespere: Oficiala balo

Sabaton 28.a de aŭgusto
- Akcepto en Alghero kaj vizito al la Grotoj de Neptuno

Dimancon 29.a de aŭgusto
- Ekskurso al Nuoro -Folklora manifestacio KAVALKADO -Komuna manĝo -Ferma kunsido.